

Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)
kaj fervojfaka revuo



ISSN 1397-4270

2019.3

La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn



Neniu rigardas ...

Karaj gelegantoj,

“Nobla viro notu siajn lastajn vortojn sur slipo kaj demandu la amikojn pri ties opinioj. Li neniam okupiĝu nur lastmomente pri tio kaj fidu, ke saĝa ideo ĝuste en tiu momento ebligos al li diri ion brilan.” Je mia bedaŭro tiun bonvolan konsilon de Mark Twain mi malatentis, kvankam la redakto de lasta IF-eldono en mia oficperiodo ne alvenis surprize.

Deziri al la posteulo sukceson en la transprenota tasko estas supraĵa gesto, nelaste ĉar ni ĉiuj scias, ke la sukceso dependas de bona, funkcia kunlaboro en teamo kaj de impulsoj el la membraro, de membraro laŭnombre malkreskanta, fidela al la lingvo kaj ĝiaj celoj, sed paŝon post paŝo pli fremda al la fervoja sfero, al entreprenoj perdantaj la intereson pri siaj kunlaborantoj (des pli pri iamaj), forŝovantaj branĉojn ne sufiĉe profitigajn kaj neglektantaj ion tian kiel “socian daŭripovon” - aliaj entreprenoj ĝin uzas kiel argumenton serĉante fakulojn en la preskaŭ malplena merkato.

Kie malaperas la subteno de la entrepreno, tie malaperas la kulturaj kaj libertempaj grupoj. IFEF tion sentas per ĉiu landa asocio, kiu anoncas sian malfondon. La federacio kiel sumo de siaj landaj asocioj sole povas konsili, subteni, helpi teni ilin vivaj aŭ revekigi ilin. Helpo tamen ne estas agado paralela al tiu de la ekzistantaj asocioj, kiel ekz. la reklamcela kolekto de eblaj interesuloj en senkotiza IFEF-membrokategorio. Ni certe aŭdos pri tio en la sekvonta komitatkunsido.

IFEF necese koncentru la restintajn fortojn al sia esenca tasko oferti okazojn por la apliko kaj pluevoluigo de la faka lingvo: per tiu ĉi bulteno, per seminarioj, renkontiĝoj, asembleoj kun faka programo kaj per serioza kunlaboro kun la terminologoj de UIC.

Amikajn salutojn

Guido Brandenburg



Enhavo:

Karaj gelegantoj	42
Enhavo, presindikoj.....	43
Malalte al Berlino.....	44
Neniu rigardas.....	47
Pontvizioj	49
Jarraporto de la Sekretario pri la jaro 2018	51
Bonvenon en Malago	56
Memoroj pri nia fervojfaka terminologio d-ro Heinz Hoffmann	58

Titolpaĝo: Malobeo al trafikreguloj kaŭzas 90 procentoj de akcidentoj ĉe traknivelaj pasejoj.

(foto: Eltranĉaĵo el filmo „sicher drüber“, DB Mediathek), vd. paĝon 47

Internacia Fervojisto

Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)

Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro

Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

Estraro de IFEFF

Prezidantino: Rodica Todor (Rumanio) rodica_todor@yahoo.com

Sekretario: Vito Tornillo (Italio) vitorni@virgilio.it

Kasisto: Laurent Vignaud (Francio) laurent.vignaud@free.fr

Redaktoro: Guido Brandenburg (Germanio) guido.brandenburg@t-online.de

Gvidanto de la Faka Komisiono: Jan Niemann (Danio) niemann@kabelmail.dk

Membroj de la Redaktora Komisiono

Lene Niemann (Danio), Jean Ripoche (Francio), István Gulyás (Hungario)

Membroj de la Faka Komisiono

Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko), N.N.

Bank-Konto:

Nomo: „Laurent Vignaud“

IBAN: FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237

BIC: PSSTFRPPNTE

UEA-konto: iffk-o

Retejo: www.ifef.net

Facebook: <https://www.facebook.com/pages/IFEFF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372>



Realeco ekde Decembro 2023 – la ECx survoje kun kondukvagono antaŭe
(bildo: Mediathek Deutsche Bahn)


Malalte al Berlino

En Februaro 2019 anoncis la Germana Fervojo (DB) elekton de firmao Talgo por liveri trajnkompleton de nova generacio Talgo 230 por long-distanca kaj internacia transportservoj.

Kongrue kun rezulto de internacia konkurso estis subskribata kadra kontrakto por 100 trajnkombinaĵoj kun livero de unuaj 23 enkondukaj ekzempleroj en valoro de 550 milionoj da Eŭroj. La trajnkombinaĵo konsistos elektra lokomotivo, kondukvagono kaj dek ses intermetitaj vagonoj. Ĝi atingos maksimuman rapidecon de 230 km/h.

DB planas trafiki per Talgo 230 unuan fojon en la jaro 2023 sur la linio Berlin – Amsterdam. En somero 2024 sekvu la turisme favorataj linioj Köln – Westerland(Sylt) kaj Hamburg – Oberstdorf. La dusistema kapableco estos uzata dum vojaĝoj al Nederlando, dum la aliaj du linioj ne estas komplete elektrizitaj.

Planita trafiko per longdistanca trajno "ECx"



Deutsche Bahn AG | März 2019

La Germana Fervojo publikigis konkurson en la jaro 2017 kun celo anstataŭigi nemodernan floton de lokomotivoj kaj vagonoj uzataj en InterCity kaj EuroCity-itineroj per novaj unuetaĝaj trajnkompletoj – nome tie kie oni ne uzas ICE grandrapidajn trajnojn. La trajnoj havos minimume 485 sidlokojn en la dua klaso, 85 sidlokojn en la unua klaso kaj disponigos similan komfortnivelon kiel ICE-trajnoj. Ili estu konvenaj por trafiko en Germanio, Aŭstrio kaj aliaj Eŭropaj landoj, inkluzive Nederlandon.

La novaj trajnoj havos labornomon ECx, longo de la trajno (sen lokomotivo) estas 235 m, la nombro de radaksoj 20. La unua postlokomotiva kaj la kondukva vagonoj unuflanke havas boĝiajn ruliĝekipaĵojn dum la intervagonaj ruliĝekipaĵoj estas Talgo-tipe unuradaksaj kaj lokitaj inter la vagonkestoj.

Tiu konstrua detalo permesas malaltigi la vagonan plankon al 76 cm super relsupronivelo kaj tiel ebligas senŝtupan eniron de la samalta kajo – respektive enŝovon de rulĉaroj.



La malalta vagonplanko ebligas senŝtupan eniron de la kajo.
(bildo: Mediathek Deutsche Bahn)

La malplena trajno pezas 425 t. La lokomotivoj de Talgo 230 estas kvar-rad-aksaj kaj ekipitaj per tri sistemoj de kurentoprovizado – 25kV 50Hz, 15 kV 16 2/3 Hz kaj 3kV DC. Por linioj sen elektrizado eblos uzi dizelajn lokomotivojn.

Fontoj:

Railway Gazette
06 Feb 2019;
Pressestelle
Deutsche Bahn



La Duaklasa grandkupea vagono en Ecx-trajno
(bildo: Mediathek Deutsche Bahn)

Neniu rigardas ...

La barieroj estas malfermitaj. Aŭtomobilo venanta deflanke haltas antaŭ la blanka markostrio. Samo okazas sur la alia flanko de la pasejo, kiu situas en la centro de Bonn kaj krucas dutrakan ĉeflinion Köln – Mainz. Konforme al la regularo ĝi estas ekipita per sekuriga instalaĵo itinerŝaltata signalile gardata kun aŭtomata liberkontrola sistemo. Alproksimiĝas virino kun ĝisrande plena superbazara ĉaro. Ŝi hezitas momenton kaj ŝovas ĝin trans la unuan trakon, kie la radoj kaptiĝas en la radflangâ fen-do. Dum ŝi ĉirkaŭas la ĉaron por daŭrigi sian vojon tirante, fermiĝas la elira barieroparo. La virino senhaste tiras la ĉaron trans la duan trakon dum fermiĝas ankaŭ la eniraj barieroj. Sen eblo eskapi ŝi alveninte sur la alia flanko manovras la ĉaron en flankan pozicion kaj atendas. Eble unu minuton poste du metrojn apud ŝi pasas Intercity-trajno. La topografio en tiu loko permesas rapidecon de nur 100 km/h. La barieroj malfermiĝas, la virino ordiginte sian mantelon plutrenas sian ĉaron kaj malaperas el la bildo.

Tiu filmeto registrita de kamerao postlasita instalinte la liberkontrolan sistemon, kaŝe-malkaŝe migris tra la fervojinterna reto ĝis la ŝtata trafikaj administrejo postulis kontrolon, raporton kaj konsekvencojn kun argumento, ke homa observanto estus ekkoninta la situacion kaj evitinta la danĝeron.

En la diskuto pri kio efektive estis okazinta, la ondo rapide malkreskis, ĉar unuflanke la virino evidente konscie neglektis elementajn trafikajn regulojn kaj ĉar aliflanke la sola tasko de la liberkontrola sistemo estas preventi endanĝerigon de la reltrafiko.

Tamen la demando ĉu la fervojo faras ĉion enkadre de siaj teknikaj (kaj financaj) eblecoj por redukti la danĝeron de si kaŭzatan, ne estis kontentige respondebla.

Ankaŭ la konstato, ke akcidentoj ĉe traknivelaj pasejoj majoritate estas kaŭzataj de la viktimoj mem - 90 procentoj de la akcidentoj okazas pro neglekto de trafikaj reguloj (1) – ne estas vere trankviliga.

Antaŭ nelonge aperinta artikolo (2) redirektis la atenton al la demando ĉu la fervojo faras sufiĉe. Temis pri reformo de la aŭstra fervoja leĝaro, kiu

ekde la 6-a de Majo 2010 permesas instali fotoaŭtomatojn por dokumenti malatenton de haltordono antaŭ traknivelaj pasejoj.

Pri evoluigo respektive adapto la infrastruktura sekcio de la Aŭstraj Federaciaj Fervojoj intertraktis kun firmaoj liverantaj similajn aparatojn por kontrolo de la strata trafiko. Fiksendaj estis detaloj kiel la bildformato, la kamera-sistemoj, perspektivoj, unu- aŭ dudirekta kontrolo, ekaga impulso, amplekso kaj transsendo de kolektataj datenoj, daŭro de funkcikapablo kaj multaj pli.


Rezulte de la pilotaj eksperimentoj de 2012 ĝis 2016 sekvis mendo de komence 100 instalaĵoj, el kiuj

30 servu konstante dum la aliaj laŭcikle funkcii aŭ estu anstataŭigataj per



posticĵoj. La sistemo sole referencas al bild-datenoj el observo de la pasejo. Ĝi rezignas pri indukciaj bobenoj en la stratsurfaco kaj fizika dependeco de la sekuriga instalaĵo. La ekagan impulson liveras la ruĝa lumo de elektita stratsignalilo. Ekde tiu momento la sistemo kontrolas difinitan areon kaj de enpenetrantaj objektoj produktas kvar fotojn, kiuj pruvas pozicion kaj movon. Hejtilo kaj infraruĝluma fulmlampo permesas funkcion sendepende de temperaturo kaj heleco.

Dum en la pilota fazo policaj komisiitoj devis regule transpreni la datenojn ĉifrite storitajn en la aparato, aktuale la sistemo komunikas laŭ duŝtupe ĉifrita transsendoprotokolo kun serviloj de la polico, kiu siaflanke transdonas la datenojn kaze de signalmalobeo al la respektiva distrikta administracio taskita enspezi la punpagojn. Kvinonon



de ili ricevas la infrastruktura sekcio de la Aŭstraj Fervojoj por kompensi la vartado-kostojn.

Datenoj sen rilato al signalmalobeo ne estas storataj. Kio okazas al la aliaj, dependas de la koncernata persono kaj estas regulata kadre de la ĝenerala datenprotektita regularo.

Malrespekto de la ruĝa lumo mezume okazas tri ĝis kvin fojojn tage. Plej ofte tio okazas ne antaŭ la trajno sed post ties paso, kiam la barieroj en momento de liberigo ankoraŭ ne estas atingintaj la finan pozicion kaj la lumo tial ankoraŭ ne estingiĝis. La alto de la monpuno dependas de la momento de la delikto. En Aŭstrio ĝi varias inter 100 € kaj 726 €.

La enkonduke priskribitan scenon tia sistemo kompreneble ne povus eviti kvankam principe krom la strato ankaŭ la najbara trotuara strio estus kontrolebla. Sed kiel identigi la senrespektan individuon? Vizaĝrekono en publikaj areoj almenaŭ en Eŭropo estas tikla afero.

fontoj

(1) *Bahnübergangstatistik, DBNetz AG 2016*

(2) *Signal+Draht, 1-2/2019, DVV Media*

Guido Brandenburg

Pontvizioj

Se li estus kaptito sur la insulo Saĥaleno, la aŭtoro Anton Ĉeĥov komentis antaŭ pli ol cent jaroj, li farus ĉion eblan por eskapi.

Tondrantaj marondoj kaj senarabaj montoj ankoraŭ hodiaŭ karakterizas ne nepre agrablan lokon. La maro ankoraŭ hodiaŭ dum ses monatoj estas glacikovrita. Nur la enteraj trezoroj nafto kaj gaso kaj bonaj salajroj allogas kuraĝajn laboristojn. Saĥaleno estas riĉa sed estas izolita plej orienta finaĵo de Rusio.

La insulo volonte havus pli gravan rolon, rolon kiel parto de orient-okcidenta konekto. Jam delonge ekzistas planoj pri pontokonstruo. En la jaro 1950 ili preskaŭ estus realiĝintaj – post sekreta decido de Josef Stalin. La laboroj komenciĝis ne atentante kostojn kaj ne atentante ke la ponto nur estus interligo de du vilaĝoj sen strato aŭ fervojlinio. Se Stalin ne estus

mortinta la jaro 1953, la ponto starus kvazaŭ monumento en nenio. Sed 22 tagojn post lia morto la iama sekretpolica ĉefo nuligis la projekton.

Rusaj oficistoj revekis la forgesitan projekton en la jaro 1999, kalkulis kostojn de 4,5 miliardoj da eŭroj kaj instigis la akcepton en la moderniga plano de la Rusa Federacio. Ĉu la konstruo nun okazos, laste decidas la rusa prezidento. Tiel oni citas Anton Sajcev, la vicguberniestron de Saĥaleno. La enloĝantoj kaj la ekonomio de la insulo dependas de varlivero. Sen fervoja konekto al firma tero la varoj alvenas per ŝipo. Sole tio konsumas 30 procentojn de la prezo.



Ponto ebligus kreskigi la kargotrafikon. Sajcev kalkulas pri dekkvinobligo al 4,5 milionoj da tunoj pojare. Florantaj vizioj interligas Saĥalenen kun la japana insulo Hokajdo, per dua 40 km longa ponto je kostoj de 45 miliardoj da eŭroj. Laŭeble Japanio ĝin financu, ĉar per ambaŭ pontoj Japanio akirus aliron al la transsiberia fervojo kaj povus transporti siajn varojn sen transkargado al Eŭropo – tri fojojn pli rapide ol nun.

La intereso en Tokio tamen estas modesta. La rilato inter Rusio kaj Japanio restas malfacila. Ĝis hodiaŭ ambaŭ landoj ne interkonsentis pri pakontrakto post la Dua Mondmilito, interalie pro Saĥaleno kaj pro la najbara insulgrupo de Kuriloj. Kiel ĉie en la internaciaj rilatoj ekonomia potenco en formo de investoj influu politikajn decidojn. Sed solvo ne videblas.

Tamen ankaŭ sen pontoj la komerco en tiu regiono bone evoluas. La valoro de varoj interŝanĝitaj de Japanio kaj la regiono Saĥaleno en la jaro 2017 sumiĝis al 4 miliardoj da dolaroj.

La Caro estas fora kaj en la oriento oni aranĝas sin laŭ la eblecoj, kion ajn oni planas en Moskvo.

Laŭ *Frankfurter Allgemeine Zeitung*, 27.11.2018

Guido Brandenburg

Jarraporto de la Sekretario pri la jaro 2018

Antaŭrimarkigo

La ordo de la raporto estas kiel tiu de la lastaj jaroj por faciligi komparojn. Pli detalajn informojn pri diverspecaj agadoj oni trovas en la lasta "Resuma jarraporto de la landaj asocioj".

Mallongigoj:

e-o=estraro, Ĉk=Ĉefkomitatano, e-kunsido=estrarkunsido, LA=landa asocio, Pr-ino=Prezidantino, Sk=Sekretario, Ks=Kasisto, Rd=Redaktoro; FK=Faka Komisiono; K-kunsido=Komitatkunsido



1. Membrostato

La aktuala membrostato de IFEF estas: 285 laŭ la pagitaj kotizoj (el kiuj 10 IM), 1017 laŭ la sumo de la membroj de la unuopaj LAj. La landaj asocioj estas 15.

2. Interna laboro

2.1. Estrarkunvenoj

La estraro kunvenis trifoje: la 25-an de Majo 2018 fine de la 70-a IFK en Vroclavo (PL), rete la 21-an de Aprilo 2018 kaj de la 6-a ĝis la 9-a de Septembro 2018 en Wels (AT).

La temoj de la kunvenoj jam estis traktataj detale en la protokoloj.

En la reta kunveno ĉefe estis traktata la organizado de la kongreso en Vroclavo, laŭ raporteto de LKK pri ĝia situacio kaj novaĵoj. Pri la aliaj taskoj kaj rilatoj, PEFA klopodis. Konfirmo venis pri la postkongreso en Krakovo. Alia temo estis elekto de Ĉk kaj anstataŭanto.

Dum la kongreso en Vroclavo en Majo 2018 okazis kiel kutime laŭstatute la nepublika komitatkunveno kaj la plenkunsido malferma al ĉiuj kongresanoj. Okazis elekto de Ĉk kaj anstataŭanto. Decidoj kaj raportoj aperis en nia bulteno IF n-ro 2018.4.

En *Wels* kunvenis la estraro kadre de la FISAIC-festivalo. Ĝin krom korusoj, blovorkestroj kaj folkloraj grupoj, partoprenis la aliaj kulturaj grupoj de FISAIC per ekspozicioj kaj prezentadoj. Ankaŭ IFEF kaj Esperanto estis bone prezentataj al la fervojistoj kaj en la urbo. IFEF havis budon en la foira halo, kie la e-o kun helpo de la aŭstraj kolegoj Martin, Leopold, Ernst

kaj Reiko, disdonis informilojn en tri lingvoj (germana, franca, angla) kaj parolis kun multaj vizitantoj. Reklamado okazis ankaŭ en la urbo per afiŝoj kaj per la parado kiu okazis tra la ĉefaj stratoj de la urbo. Dum la e-kunsido oni traktis diversajn organizajn temojn: situacio rilate organizadon de la kongreso en Malago laŭ la informoj de LKK kaj sekva diskutado pri solvo de eventualaj problemoj; kasraporto, elekto de estraro kaj anstataŭanto de Hoffmann en FK.

La e-o decidis okazigi retan voĉdonon pri statutŝanĝo por nuligi la nepublikan kunsidon dum kongreso. La voĉdono okazis en Oktobro, per kiu la Komitato aprobis nuligon de la nepublika K-kunsido.

2.2. Ĉefkomitatano

La ĉefkomitatano plenumis akurate siajn multflankajn taskojn; i.a. li dissendis la cirkuleron kun demandilo pri la landaj jarraportoj por la jara resumo. Kune kun la Ks kaj la Rd daŭre ĝisdatigis la adresaron de la IFEF-funkciuloj. Kune kun la Sk kaj la Ks li prizorgis la kolektadon de la demandiloj kaj instigis la malfruiĝintojn respondi. Li bone atentigis la komitatanojn sendi en ĝusta tempo la petojn pri statutŝanĝoj kaj la eventualajn kongresproponojn. Li krome petis landajn asociojn anonci datojn de siaj jarkunvenoj aŭ konferencoj okazontaj en la postraporta jaro por plani kalendaron de IFEF-aranĝoj, kiu evitu samtempajn aranĝojn precipe en najbaraj aŭ proksimaj landoj. En Majo, post la balotoj dum la plenkunsido, Zlatko Hinšt fariĝis Ĉk kaj Ladislav Haki anstataŭanto.

2.3. Vizitoj

Printempa e-kunsido ne okazis, tamen la Pr-ino kaj la Sk kunvenis en Malago kun la LKK de la venonta IFK por trakti programon kaj detalojn pri la organizado de la kongreso. Kune ili vizitis (kaj elektis) la kongresejon kaj kelkajn eblajn ekskurscelojn. Ĝi estis okazo por inviti la Hispanan kaj Andaluzan Esperantajn Asociojn kongresi samtempe.

En *Wels* la estraro partoprenis programon de la FISAIC-festivalo.

2.4. Situacio kaj estonto de IFEF en kelkaj landoj

La situacio en la landaj asocioj de IFEF ŝanĝiĝis, bedaŭrinde ne plu ekzistas asocioj en Belgio kaj Hispanio (Katalunio), kvankam ankoraŭ estas homoj

interesitaj en la du landoj kaj en Hispanio eĉ okazas IFK. La e-o esperas ke dum la kongreso okazu diskuto, kiel restarigi la du perditajn asociojn. La rilatoj kun aliaj fakaj asocioj daŭre pliboniĝis kaj kreskis.

3. Laborplano

3.1. Informa Servo

La korespondado okazas pere de interreto, ni pli bone povus nomi ĝin informado, ĉar ĉiuj membroj povus korespondi samtempe kun ĉiuj aliaj membroj per IFEF diskutad-grupo kaj pere de Fejsbuko ricevi kaj doni informojn. Pere de la paĝo ifef.net la membroj kaj la eksteruloj povas ricevi ĉiujn informojn pri ĉio, kio estas enretigita, ĉefe pri fakaj novaĵoj. Okaze de la FISAIC-festivalo la faldfolio pri IFEF en tri lingvoj (germana, franca, angla) estis disdonita al multaj neesperantistaj interesitoj kaj estis instigo reklami la kongreson en Malago. Dum la UK IFEF kunlaboris samcele kun HEF kaj AEU.

3.2. Junularo

En la jaro 2017 la kongreso en *Colmar* IFEF gastigis junan ĉinan fervojistan esperantiston. Por la estraro tio estis bona okazo por instigi junulojn partopreni kaj kunlabori dum kongreso. Ĉijare neniu estis proponata aŭ sinproponis.

3.3. Faka Komisiono

3.3.1 Terminara Sekcio

Dum la pasintaj 12 monatoj la laboro daŭris por pluevoluigi Esperanto-enhavon en la terminaro de la Internacia Fervojunio UIC. Bedaŭrinde pro malsano de Hoffmann la laboro haltis kaj ne aperis Terminara Kuriero. Ĝis tiam estis reviziataj fakaj tekstoj por artikoloj kaj prelegoj.

3.3.2 Fake Aplika Sekcio

En la jaro 2018 aperis la "FervojFaka Kajero" n-ro 26. FervojFakaj Kajeroj kaj aliaj fakaj publikaĵoj estas enretigitaj en la paĝo "ifef.net".

3.4 Komisionoj kaj laborgrupoj

El la komisionoj kaj laborgrupoj venis raportoj pri la agado.

Parolante pri la eksteraj rilatoj la Pr-ino raportis pri siaj interrilatoj kun aliaj organizoj dum diversaj aranĝoj kie ŝi estis invitita.

La informada grupo daŭre ĝisdatigas novaĵojn en la paĝoj de ifef.net kaj "Facebook" kaj donas informojn pere de nunaj telekomunikad-rimedo. Dum la kongreso en Vroclavo okazis ateliero pri ĵurnalismo titolita "Kiel efike kunlabori kun redakcioj kaj ĵurnalistoj" sub la gvido de la ĵurnalisto Alfred Schubert.

3.5. Fervojista kontaktkunveno dum la 103-a UK Lisbono, Portugalio (28-a de Julio ĝis 4-a de Aŭgusto 2018)

Dum la UK en Lisbono okazis la kutima fervojista kontaktkunveno kun multaj partoprenantoj. La IFEF Pr-ino prezentis fervojan prelegeton kaj la kongreson en Malago. Ankaŭ sabate dum la Movada Foiro de asocioj ŝi prezentis IFEF disdonante informilojn kaj aliĝilojn por la kongreso en Malago. La tablo staris apud tiu de la Hispana Asocio, tiel eblis komune reklami pri la kongresoj.

4. Aranĝoj

4.1. IFEF aranĝoj de LA

Laŭ la indikoj de la jarraportoj de L.A. multaj el ili aranĝis kunvenojn kun ĝenerala asembleo, kelkaj nur la ĝeneralan asembleon. La programo antaŭvidis ankaŭ prelegojn kaj ekskursojn. Kelkaj eksterlandaj IFEF membroj vizitis tiujn aranĝojn.

4.2. IFEF-Kongreso

La 70-a IFK Vroclavo (PL) 19. - 25. majo 2018. La kongreson partoprenis 124 esperantistoj el dudek landoj. Ĉeestis gastoj el Aŭstrio – Belgio – Bulgario – Ĉeĥio – Ĉinio – Danio - Francio – Germanio – Hispanio - Hungario – Italio – Kroatio - Litovio – Britio (Norda Irlando) – Norvegio - Pollando - Rumanio - Slovakio - Svedio - Usono. Dum la inaŭguro ĉeestis reprezentanto de la urbo, de fervojo (Malsupra Silezio), de pluraj esperantistaj asocioj, la rektoro de Vroclava Universitato. Detalaj raportoj kaj simplaj impresoj alvenis de diversaj partoprenantoj.

La temoj de la kongreso estis bone pritraktataj. La ĉefa prelego temis pri: "Rekonstruado de fervojaj arkadoj en *Gorzów Wielkopolski*". Multaj aliaj

prelegantoj prezentis novaĵojn el siaj landoj. Rimarkinda estis la vizito al la fervoja muzeo de *Jaworzyna Śląska*. Por la fervojistoj kaj la amikoj de fervojo ĝi estis fake ege interesa. La kongresaj vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj, folkloro tradicio kun kantoj kaj dancoj. Plejparte ili okazis en la reĝa salono de la Vroclava stacidomo “*Wrocław Główny*”. La ekskursoj malkovris al ni nekonatajn lokojn, historiajn kaj naturajn.

5. Eksteraj rilatoj

5.1. UEA

La kontaktoj kaj kunlaboroj inter UEA kaj IFEF daŭre estas bonaj. La Pr-ino partoprenis la UK-on kaj sin dediĉis al la reklamado kaj informado de IFEF, ĉefe dum la movada foiro kaj dum la fervojista kontaktkunveno. Tie ŝi prezentis la venontan kongreson kaj prelegojn faritajn en Vroclavo. Krome ŝi partoprenis plurajn kunsidojn kiel IFEF-komitatano “A” ĉe UEA.

5.2. FISAIC

La kongreso en Vroclavo okazis sub la patroneco de FISAIC, la informo aperis en la FISAIC-kalendaro. Bedaŭrinde ne estis invitita reprezentanto de FISAIC. Funkciulo de loka fervojo ĉeestis dum la inaŭguro.

En Septembro la estraro kunvenis en *Wels* (AT) dum la FISAIC-festivalo. Tiu estis okazo por IFEF montri sin al aliaj FISAIC-grupoj kaj al la ekstera publiko.

Fina komentario

La ĝenerala situacio de IFEF estas preskaŭ stabila. La membronombro estas iom pli malalta, bedaŭrinde dum la jaro du landaj asocioj malfondiĝis, Hispanio kaj Belgio. Ni esperas ke baldaŭ ili refondiĝos, ĉar kelkaj iamaj membroj signalis daŭran intereson aliĝante al IFEF individue. Inter la fakaj asocioj de UEA IFEF estas unu el la plej grandaj.

La rilatoj kun aliaj esperantistaj asocioj estas bonaj. IFEF klopodas okazigi renkontiĝojn kunlabore kun aliaj asocioj por plifortigi nian movadon.

Bolonjo, la 1-an de Marto 2019

Vito Tornillo, la IFEF-Sekretario

Bonvenon en Malago!

Salutvortoj de la IFEF-prezidantino direktitaj al la partoprenontoj de la 71-a Internacia Fervojista Kongreso

Ĉi tiu esperantista aranĝo estas aparta el pluraj vidpunktoj...

Historia, ĉar la urbo Malago estas inter la unuaj semistoj de Esperanto en Hispanio. La malagano José Rodríguez Huertas estis aŭtoro de la unua lernolibro por hispanoj (1890), la fondinto de la unua societo de Hispanio, tiu de Malago (1892), kaj en tiu urbo oni kredeble kreis la unuan ZEO-n*, ŝipon nomitan "Esperanto".

Hispanio estas lando, kie en la jaro 1909 la antaŭuloj de IFEF okaze de la 5-a Internacia Kongreso iniciatis la unuan paŝon al kunlaborado inter fervojistoj pere de Esperanto, tiel ke nun ni povas festi la 110-jariĝon de nia fervojista movado.

Plie, inter la du mondmilitoj, la Hispana Esperantista Fervojista Konfederacio kun 300 membroj, multaj el ili ankaŭ HEA-anoj, estis unu el la laŭnombre plej grandaj asocioj.

Kultura, ĉar Hispanio signifas historion, arkitekturon, muzikon, dancon, literaturon, pentradon, kuirarton – unuvorte: ĝermon aŭ esencon de kulturo, kiu influis Eŭropon. Sed ne nur tion, ĉar ĝi ankaŭ estas turisma celpunkto kaj revo por homoj alvenantaj el ĉiuj anguloj de la mondo. Dank' al niaj gastigantoj ni kongresos en unu el la pro ilia riĉeco arta kaj arkitektura plej admirataj regionoj de Hispanio. La loka kulturo interkonatigos nin kun koloroj kaj spirito de la hispanaj kantoj kaj dancoj (flamenka/andaluzia tradicia etoso) kun verkoj de la mondfama pentristo Pablo Picasso. La vesperaj kulturaj programeroj certe tuŝos nian koron kaj la turismado malkovros al ni vizitantoj interesajn perspektivojn al tiu regiono - de prahistoria epoko tra mezepoko ĝis la nuntempo. Influoj de civilizacioj egipta, fenica, greka, romia, bizanca, islama kaj kristana videb-



las en diversstilaj konstruaĵoj, en dolmenoj, fortikaĵoj, placoj kaj stratetoj, preĝejoj, monaĥ(in)ejoj, sonorilturoj, alkazaboj, palacoj, diverstipaj muzeoj (pli ol 30 sole en Malago).

Faka, ĉar la faka programo promesas al ni klerigan rigardon tra la historio de transporto - de unu el la plej antikvaj antaŭurbaj fervojoj de Malago (Zafarraya) ĝis la hodiaŭa "AVE" (Hispana grandrapida trajno), de la morgaŭaj vojaĝoj per HYPERLOOP ĝis veturado tra la interplaneda spaco.

Kunlabora, ĉar en LKK mirinde kunlaboras ses asocioj: UEA, ILEI, HEFA, AEU, IFEF, Amikaro de Fervojo (Amigos del Ferrocarril), kiuj kunigis la fortojn por ke la programo de la kongreso estu ege riĉa kaj diversflanka.

Pro tiu eksterordinara kunorganizado la interesiĝantoj povos aliĝi kaj trapasi la KER-ekzamenon surbaze de la eŭropaj normoj ricevante oficialan atestilon, kiu estas verkita en 4 lingvoj (Esperanto, angla, germana kaj franca); la scivolemuloj pri internacia lingvo povos ĉeesti lecionojn gvidatajn de spertaj E-instruistoj, la atelieroj pliriĉigos la konojn pri kiel adaptiĝi al nuna informadika epoko, sed ankaŭ pri kiel arkivadi niajn historiaĵojn. Diverstemaj prelegoj informos pri la lingva situacio en Eŭropo kaj ĉefe pri la pozicio de Esperanto en Hispanio, en Eŭropo kaj en la mondo.

Ni ne forgesu ke en la jaro 1993 la Hispana Esperanto-Federacio estis nomumita asocio de "publika utilo", kio signifis konfirmon, ke ĝia laboro kaj celoj estas socie kaj kulture interesaj.

Ĝuste pro tio mi estas ege dankema al niaj gastigantoj kiuj invitis nin kongresi sur hispana grundo. Mi forte deziras ke tiu kongreso plifortigu kaj evoluigu nian movadon, ke ĝi estu ĝojplena por ni ĉiuj, kaj restu en nia memoro kiel neforgesebla travivaĵo.

**) ZEO = Zamenhof- kaj Esperanto-Objekto (klarigo por ne-kolektantoj, Red.)*



San Benedetto 66-a IFK
Heinz Hoffmann enmeze de la malgranda germana delegacio

Memoroj pri nia fervojfaka terminologo d-ro Heinz Hoffmann

Eksciinte pri la morto de nia kolego, la elstara fervojista esperantisto Heinz Hoffmann la 28-an de Decembro 2018 mi esprimis kondolencon al Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) petinte ke ties estraro per tion ankaŭ al lia familio.

Mi ankaŭ decidis informi nian landan asocion kaj skizi kelkajn detalojn el lia plurjara teminologia laboro.

Kunvenon de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA) la 8-an de Januaro 2019 mi eluzis unuparte por paroli pri miaj memoroj al kara kolego kaj amiko Heinz. Dum kunveno la 15-an de januaro 2019 mi ankoraŭfoje ripetis kaj aldonis detalojn pri lia faka laboro kiel Sekretario de Terminara Sekcio (TS) en kadro de Faka komisiono (FK) de IFEF.

Gravaj detaloj rilatis al maniero de prezento de fervojaj fakaj terminoj dum liaj gvidadoj de kunvenoj en IFEF-kongresoj. Li samtempe estis re-

doktoro de Komunikilo de TS "Terminara Kuriero" (TeKu). Li estis doktoro pri teknikaj sciencoj, fervoja fakulo por teknikaj kaj fervojtrafikaj projektoj, eksa docento en Teknika Altlernejo en Dresden. Liaj proponitaj fakterminoj kiel terminproponoj estis en du, tri aŭ kvar terminoj akompanataj kun teknikaj skizoj aŭ fotoj por pli facile pli bone komprenadi ilin. Ĝis nun li estis unika kaj neanstataŭigebla kaj kompetenta fakulo kaj meritoplena esperantisto.

Unuafoje mi aŭdis pri s-ro Hoffmann dum IFEF-kongreso en Plovdiv (Bulgario) en la jaro 2002, poste ni vidis lin en Dresden 2003 kaj en Sopron 2004. Dum la 57-a IFEF kongreso en Braşov (Rumanio) mi fariĝis membro de Terminara Sekcio reprezentante la kampon de mia okupiĝo pri plano, analizo kaj statistiko. Inter kongresoj ni ofte korespondadis. Mi memoras niajn diskutojn pri teknikaj terminoj rilate al Eŭropa Fervojtrafika Komandosistemo (angla mallongido ERTMS), kiu instigis min pristudi artikolojn pri ĉi-tiu temo en fervojfaka revuo, kvankam mi profesie ne okupiĝis pri tekniko. Poste kelkfoje li petis min pri traduko de difinoj de terminoj en kroata lingvo al Esperanto. En TeKu li prezentis la terminojn ne nur en Esperanto sed reference ankaŭ en ĉeĥa, dana, franca, germana, hungara, itala, pola, rumana kaj serba lingvoj. Post morto de la serba TS-kunlaboranto inĝeniero Ludoviko Sekereš kaj ekfunkcio de kroata kunlaboro en la UIC-komisiono por fakterminoj kroata lingvo estas preta je certa nivelo por apliko, kaj ĝi plue estas uzata anstataŭ la serba lingvo en TS. Aldoniĝis ankaŭ la slovena lingvo. Estas tempo por enkonduki en laboro de TS anglan lingvon, sed ne neglektante aliajn lingvojn, kio estus grava estonta progreso. Grave estis fari reviziojn de malnovaj terminoj kaj anstataŭigi ilin per novaj pli taŭgaj terminoj. Tiun laboron d-ro Hoffmann regule faris.

Li sukcese kunlaboris kun fakterminara kunlaborantino Rosalinde Taucher - terminologino de UIC (Internacia Fervoja Unio) en ties pariza sidejo. Pro nasko de filino ŝi forlasis la sidejon, kaj la taskon de terminologo transprenis Nicolas Raynal. D-ro Hoffmann aktualigadis tiamaniere version de porklienta reta terminaro de RailLexic. Esperanto estas nun unu el la 27 datumbankaj lingvoj* (informoj el Terminara Kuirejo kiel artikolo de H. Hoffmann en TeKu 156, p. 1).

Ni renkontiĝadis dum IFEF-kongresoj, kie li okazigadis fakajn prelegoj kaj diskutojn, prezentinte rezultojn dum la jaro de kontaktoj kun legantoj de TeKu. Dum la lastaj jaroj de lia agado al li helpadis nia kolego Guido Brandenburg lerta en teknikaj aferoj. Dum kongresoj estis aprobitaj decidoj pri elektoj de jam proponitaj fakterminoj fare de TS-kunlaborantoj, kaj poste ili aperis en komunikilo TeKu. Nia lasta renkontiĝo okazis dum la 69-a IFEF kongreso en Colmar (Francio), post lia unua longa malsano. La kongreson en Wrocław kolego Heinz bedaŭrinde ne partoprenis pro nova malsaniĝo kiun li ne sukcesis venki. Lasta numero de "Terminara Kuriero" kiun ni/mi ricevis estis TeKu 156 – Novembro 2017. Lastan elektronikan poŝton de li mi ricevis kaj respondis al ĝi la 16-an de Februaro 2018. Laŭ oficiala listo tiam Terminara Sekcio havis 19 kunlaborantojn el diversaj landoj.

Danke al korespondado kun d-ro Hoffmann pritraktanta la koncernan terminaran problemaron mi verkis du artikolojn inspiritajn pri tiuj temoj kiuj prilumas la malfacilecon trovi trafajn, unusignifajn terminojn surbaze de malklara nacilingva termino-uzo, sinonimoj, eraraj nefakaj vortaroj kaj mankantaj difinoj. Tiel mi akiris gravajn novajn spertojn.

Temas pri sekvontaj publikigitaj artikoloj (de la aŭtoro Zlatko Hinšt):

1. Unu parto de terminologio el "Internacia konvencio pri la fervoja vartrafiko" – Liverkondiĉoj kaj damaĝoj de varoj, La Merkato, n-ro 92 (oktobro 2006), p. 12-19 (papera revuo kaj en interreta adreso <https://sites.google.com/site/ikefesperanto/>). - (Ĉiujn numerojn de La Merkato eblas malfermi ankaŭ pere retadreso <https://www.ikef-esperanto.net/biblioteko> - retejo de IKEF - Internacia Ekonomia Komerca Federacio) aŭ en retejo de Eventoj el Budapeŝto, en Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko (STEB) – Faka literaturo pri ekonomiko kaj direktado sub sekvonta retadreso: http://www.eventoj.hu/steb/direktado_kaj_ekonomio/liverkondicxoj.pdf.
2. Problemo de signifoj de fervojfakaj terminoj – ekzemploj el relvoja konstrutekniko, Jarkolekto de TAKE 2007, Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE), Wintzenheim – Francio, p. 18-24.

**) el tiuj 23 publikigitaj en RailLexic, Red.*